

PROFESIA BIOGRAFIO

Duncan CHARTERS eklernis Esperanton kiam li estis mezlerneĵano en Croydon, Anglujo, kie li sekvis vesperan kurson de Edward Ockey kaj krome aliĝis al la Croydon Young Esperantists Club kiun fondis Leslie Hartridge. Li komencis instrui Esperanton neformale kiam li estis studento de la franca kaj hispana lingvoj kaj literaturoj en la Universitato de Cambridge, kie li aktivis en la Junularo Esperantista Brita, interalie kiel redaktoro de ĝia organo, Kial Ne?. Diplomon pri rektmetoda instruado de Esperanto li ricevis en seminario gvidita de Andreo Cseh mem.



Li elmigris al Usono por postdiplomaj studoj en la Universitato de Indiana, kie li doktoriĝis pri hispanlingvaj studoj (lingvo, lingvistiko, literaturo, instrumentadoj). Li studis kun konataj metodologoj kaj aldone al instruado havis la respondecon prepari kaj gvidi kursarojn pri la hispana lingvo por miloj da studentoj. Li gvidis neformalan kurson de Esperanto al 90 lernantoj. En 1968 li instruis someran universitatan kurson en Brock University, Kanado, organizitan de Kajmo Brent, kaj instruis la unuan kurson pri metodoj por instruistoj de Esperanto en la Universitato de Indiana. En 1969, li instruis la unuan usonan someran kursaron je tri niveloj al 29 studentoj dum tri semajnoj ĉe la universitato North Adams State College en Massachusetts. En 1970, Cathy Schulze sukcesis organizi la unuan somerkursaron en San Francisco State (la San-Franciska Ŝtata Universitato), kaj Duncan Charters akceptis la inviton esti helpinstruisto sub ĉefinstruisto William Auld. Li sekve instruis dum multaj jaroj en tiu programo kaj en aliaj en Usono kaj en Eŭropo, inkluzive la propran universitaton Principia College kie li daŭrigas la instruadon de la hispana lingvo kaj preparis novajn lingvoinstruistojn dum pli ol 40 jaroj post aliaj universitataj postenoj. Li donis seminariojn por ILEI, kaj servis ĝin kiel prezidanto, vic-prezidanto, kaj prezidanto de ĝia Internacia Ekzamena Komisiono. Li faris profesiajn prezentadojn pri Esperanto, lingvaj instrumentadoj, la uzado de teknologio, kaj la instruado de kulturo, kaj lastatempe studis la fenomenon de poligloto kaj kion ni povas lerni de poliglotoj pri la akirado de lingvoj. Aldone al artikoloj publikigitaj en la Bulteno de AAIE kaj en IPR, li verkis la artikolon pri la lernado kaj instruado de Esperanto en la speciala numero de INDECS (2015), kaj la artikolon "Kial valoras legi literaturon en Esperanto?" en « La arto labori kune », Festlibro por Humphrey Tonkin eldonita de UEA.